

ESPERO



I.K.U.E

KATOLIKA

JUNIO 1953

No. 426

Jarkolekto 50

ESPERO KATOLIKA

Fondita de Pastro Emile Peltier, Tours (Francujo) en 1903.

Oficiala Organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)
fondita de Pastro Richardson en 1910 en Parizo.

Prezidanto: sac. A. Beckers, Kanaalstraat 9, Overpelt-Fabriek (Belgujo)

Sekretario-kasisto: S-ro L.G.C. de Jong, Utrechtseweg 81, VLEUTEN
(Nederlando), Poŝtkonto 252792.

Redakcio: F-ino Truus Durenkamp, Kasperspad 91, DORDRECHT (Nederl.)



JARABONO: Ned. guld. 4,50 aŭ egalvaloro, pagebla al jenaj landaj

REPREZENTANTOJ:

Argentino:	S-ro W. Przewolka, Av. Forrest 1400-4 ^o , BUENOS AIRES, 22 pes.
Aŭstrujo:	S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, WIEN III-40, p.k. 105.713 30 ŝil.
Belgujo:	S-ro A. de Bosschere, Regentieplaats 3 ST. NIKLAAS-WAAS, p.k. 74260 60 frs.
Brita Imperio:	S-ro N. W. Vigar, Defrene Road 43, SYDENHAM-LONDON SE 26, 7/10
Francujo:	F-ino J. Le Boedec, 18 rue Ernest Cresson, PARIS-14, p.k. 5815-56, 420 frs.
Germanujo:	S-ro H. P. Klein, Demrathkamp 28, ESSEN. p.k. 9040, 5,50 DM.
Hispanujo:	S-ro Angel Llobet, Plaza des Martires 20, MANRESA, 50 pes.
Irlando:	S-ro Lorcan O'hUiginn, Ardmore Farmhill Drive, Roebuck, DUBLIN, 7/10
Italujo:	S-ro A. L. Reni, Via Rovereto 6, VERONA, p.k. 9/16379, 800 lira.
Nederlando:	Kasisto Nederlanda Katoliko, Krugerlaan 195, GOUDA, p.k. 121449 f 4,50
Usono:	S-ro P. Golobic, 17724 Grovewood Ave, CLEVELAND 19 (Ohio) 1,50 dol.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Tiu ĉi anonceto aperas regule en ĉiuj grandaj Esperanto-revuoj. I.K.I. sendas informojn kaj legaĵojn senpage: tio tamen kostas multan monon kaj tial ni ĉiuj devas subteni tiun laboron per mondonacoj aŭ abono je la dumonata gazeto „Vojo, Vero, Vivo”. Abonprezo ned. guld. 1,20 aŭ 6 resp. kup. jare, al niaj reprezentantoj aŭ rekte al I.K.I. p.k. 268507.

ESPERO KATOLIKA

BONVENON !

Latina proverbo diras: „Varietas delectat”, la varieco estas agrabla. Nia agema sekretario kaj mi mem longtempe serĉis novan redaktoron, ĉar ne estis eble ke li daŭre faras ĉion; li nur anstataŭis la antaŭan redaktoron. Malgraŭ la multaj okupoj li ege bone kaj lerte prizorgis nian organon dum pli ol unu jaro. Ni elkore dankas lin kaj esperas ke li des pli bone laboru en la estonteco por nia Unuiĝo kaj helpu al la disvastigo de I.K.U.E. en ĉiuj landoj de la mondo.

Tutkore ni bonvenigas la novan redaktorinon F-inon Tr. Durenkamp helpata de F-ino, Th. Simonis. Mi esperas ke la estimataj estraranoj en ĉiuj landoj same kun la agemaj perantoj helpos.

Mi ne parolos pri la planoj de la nova redaktorino, sed la faktoj montros ke ŝi estas inda okupi tiun postenon: ŝi komprenas pli ol 10 lingvojn kaj do la kampo de dokumentado estas sufiĉe vasta. Ŝia teknika kaj ĵurnalistika scioj estas sufiĉe konataj por ke ni plenplene povas komisi al ŝi la malfacilan taskon de redaktoro. Mi estas certa ke E.K. iros novajn vojojn sub ŝia gvidado.

Antaŭ 50 jaroj ni komencis nian movadon sub la piedoj de nia Sinjorino de Lourdes: Denove ni iros al Lourdes dum ĉi jaro por peti al nia ĉiela Patrino ke ŝi protektu nin, nian movadon kaj niajn membrojn.

Ni esperas renkonti tie multajn gesamideanojn en la bela Suda Francujo ĉe la piedoj de la Sankta Virgulino en la groto de Masabielle. Ni alportos nian ŝtoneton al la granda internacia klopodo por obteni la pacon en la mondo. Tiamaniere la labortereno por la Esperanto-movado estos pli favora kaj pli fruktodona.

A. Beckers, prezidanto I.K.U.E.



ADIAŬ!

Jen mia respondo al la supra bonveno. Foriri estas iomete morti, diras la francoj. Kaj kvankam mi nur estis redaktoro por ke la laboro por E.K. kaj I.K.U.E. ne haltu, tamen la laboro estis tre alloga. Mi devas konfesi ke multe da laboro por I.K.U.E. tamen restis ne farita, ĉar la senĉesa aperigo de la revuo kaŭzis tro da laboro por unu persono.

Mi ĝojas, ke ni trovis en f-ino Durenkamp kapablan personon por la grava laboro. Mi deziras al ŝi plenan sukceson kaj agrablan ĝuon en la malfacila tasko kontentigi „la diablon kaj lian patron”.

Ŝi komencas en favoraj cirkonstancoj, ĉar estas denove eble eldoni la revuon en pli plaĉa vesto. Ni dankas tion ankaŭ al ŝiaj senlacigeblaj klopodoj solvi la problemojn en kiuj E.K. venis pro la internaciaj malfacilaĵoj.

Mi dankas al ĉiuj kiuj ebligis al mi plenumi mian taskon, kaj petas al ili doni al la nova redaktorino tutkoran kunhelpon.

Mia adiaŭo nur rilatas la redaktoran taskon, kaj mi esperas ke mi de nun povas dediĉi miajn fortojn al pli granda disvastigo de niaj idealoj en la landoj de la mondo.

L. G. C. de Jong, Sekr.o

AL NIA ABONTANTARO.

La redakcio de „Espero Katolika” transiris en la manojn de la subskribantino, kiu trovis fervoran kaj kompetentan helpantinon en la persono de fraŭlino Thea Simonis.

Post ĉi tiu sciigo mi vere volus vidi la mienojn de niaj sinjoroj, kiuj certe timas ke E.K. nun nepre fariĝos porvirina revuo! Vi tamen tute eraras, sinjoroj, kaj eĉ vi mem povas malebligi tion, se vi nur sendos al ni multajn interesajn artikolojn, tiel ke ni nur bezonos okupi nin pri selektado kaj aranĝado, el kio cetere ekzistas la tasko de redaktoro.

Ankaŭ ni esperas ke vi ne lasu la sendadon de artikoloj al kelkaj kunlaborantoj, kiuj pli aŭ malpli regule faras tion: ni atendas ke ĉiuj legantoj montru sian intereson. Tamen unu diros ke li ne estas kapabla, alia ke li ne havas tempon por verki artikolon. Al tiuj certe bonvolemaj personoj ni petas: se vi legas artikolon en iu gazeto aŭ revuo kiu certe interesas vastan legantaron, eltranĉu ĝin aŭ marku ĝin per kolora kraĵono kaj sendu ĝin al ni, tiam ni tradukos aŭ redaktos el ĝi ekstrakton. Vi povas sendi eltranĉaĵojn en angla, ĉeĥa, dana, franca, germana, hispana, itala, nederlanda, norvega, portugala kaj sveda lingvoj. Tiamaniere E.K. fariĝos vere internacia revuo.

Cetere ni volas fari la enhavon de nia revuo kiel eble plej varia por kontentigi la dezirojn de nia vere heterogena legantaro. Vi renkontos artikolojn pri la katolika vivo, popolsciencajn temojn, rakontojn, lingvajn problemojn, anekdotojn k.t.p., redakcian leterkeston kaj eĉ porvirinan anguleton. Jes, kial ne? Ni ja nombras inter nia legantaro multajn inojn, kaj cetere ne estas malpermesite al la sinjoroj, legi tiun rubrikon.

Volonte ni atendas viajn sugestojn, la esprimon de viaj deziroj koncerne la enhavon kaj ni laŭeble kontentigos ĉiujn, por fari nian revuon ĉiam pli interesa. Se tiam kreskos la abonantaro — kaj ni esperas ke vi ĉiuj faros propagandon por tio — ni ankaŭ povos pligrandigi la amplekson.

Vi jam konstatis ke la aspekto de E.K. plibeliĝis: tio almenaŭ estas avantaĝo rezultante el la transiro de la redakcio al virinoj, pri kiuj oni ja ĉiam pretendas ke ili tre ŝatas eksteraĵojn! Nu jes, estas vere ke ni nur volis transpreni la redakcion kondiĉe ke E.K. povu aperi en bela formo, en kio ni post longaj pripa-roladoj, serĉadoj kaj kalkuladoj fine sukcesis.

La juna artisto A. Koonings en Dordrecht estis tiel kompleza, senprofite fari por ni la dezegnon sur la kovrilo.

Ni preĝu ke Dio benu nian laboron!

Truus Durenkamp.



JUBILEA DONACO POR ESPERO KATOLIKA.

Ni sendis cirkuleron al ĉiuj niaj abonantoj kaj en ĉi tiu momento mezo de Majo, la donacoj jam komencas alflui. El Italujo ni ricevis 90 guldenojn; Aŭstrujo anoncis jam 21 guldenojn; ek de la julia numero ni publikigos la liston de la envenintaj donacoj el ĉiuj landoj aparte.



LA OKULBANKO

Multegaj blinduloj aŭ preskaŭ-blinduloj nuntempe povas reakiri la vidpovon, dank' al la progresoj kiujn en la lastaj jardekoj faris la specialistoj de la okulkuracado.

Grandan rolon ludis en ĉi tiu ĝojiga fakto S-ino Aida de Acosta Breckinridge, de Novjorko, la fondintino de la famkonata „Okulbanko”.

En 1922, ne longe post sia edziniĝo, troviĝante en eleganta marborda banloko, ŝi subite sentis terurajn dolorojn en la okuloj, dum ĉio ĉirkaŭ ŝi nebuliĝis: ŝi estis preskaŭ blinda. Ŝi vizitis tre faman okuliston, D-ron Wilmer en Waŝingtono, kiu konstatis ke la dekstra okulo estas tute perdita, la maldekstra preskaŭ, sed tuja operacio povos konservi iom da vidpovo. La operacio okazis kaj sukcesis.

Nun la sinjorino primeditis, kial do ekzistas tiel malmultaj okulspecialistoj, kiuj povas helpi nur limigitan kvanton da malfeliĉuloj. Nepre ŝi volis serĉi rimedon al tio kaj ekrevis pri tre granda okulhospitalo, kie ne nur estus kuracataj la malfeliĉuloj, sed kie samtempe D-ro Wilmer povus transdoni sian arton al aro da lernantoj.

Ŝi priparolis siajn planojn kun la scienculo kaj proponis monkollektion inter liaj dankaj eksklientoj, sed li absolute ne volis konsenti en tio. Tamen Aida ne perdis la kuraĝon, sed konspiris kun la helpantino kaj la pordistino de la kuracisto, kiuj ebligis al ŝi kompili liston de ekspacientoj. Nun ŝi komencis viziti ĉiujn kaj tiamaniere rikoltis grandajn sumojn. La riĉega familio Rockefeller proponis al ŝi, duobligi la kolektitan sumon, kondiĉe ke tiu estu almenaŭ 1¹/₂ milionoj da dolaroj kaj ke la fondota instituto estu metata sub la patroneco de oficiala medicina fakultato. En mallonga tempo ŝi kolektis eĉ pli ol la fiksitan sumon, kaj kune kun la kontribuo de la familio Rockefeller povis disponi pri pli ol kvin milionoj.

La Johns Hopkins Universitato akceptis la patronecon kaj en Oktobro 1929 la Instituto Wilmer estis oficiale inaŭgurata. Sinjorino Breckinridge denove ekkolektis monon, nun por fondi stipendkason, por ke valoraj junaj okulkuracistoj povu perfektigi sin en la

Instituto Wilmer. Malgraŭ ŝia preskaŭ-blindeco ŝi senlace laboris por atingi sian celon; ŝia organiza talento estis tiel konata, ke diversaj grandaj asocioj, kiel ekz. la amerika Ruĝa Kruco, petis ŝian kunhelpon por diversaj celoj, sed antaŭ ĉio ŝi donis siajn fortojn kaj kapablojn por plibonigi la sorton de la okulmalsanuloj. Intertempe la studado de la specialistoj ne restis sen fruktoj; i.a. ili konstatis ke certa speco de blindeco, kaŭzita pro difektiĝo de la okula kornmembrano, povas esti kuracata. Sed por tio oni bezonas homan okulmembranon, kiu devas esti almetita sur la okulon de la blindulo malpli ol sepdek du horojn post forigo de la sana okulo. La malfacilaĵo estis, ne nur akiri la membranojn, sed ankaŭ distribui ilin ĝustatempe. Por tio oni alvokis la helpon de S-ino Breckinridge, kiun neniu malfacilaĵo povis fortimigi, kaj en 1945 ŝi fondis la „okulbankon” en Novjorko, al kiu aliĝis 150 amerikaj hospitaloj. Nuntempe ankaŭ en Eŭropo ekzistas tiuj bankoj, sed kiel ili funkcias?

Unualoke oni devas disponi pri okulmembranoj. Por tio oni informas malsanulojn, ke ili povas donaci, post sia morto, siajn okulojn al la Banko. Kelkaj horoj post la morto la sanaj membranoj estas forigataj kaj transportataj al blindulo, intertempe jam preparita por la operacio. La Aerlinioj faras bonegajn servojn en tiu afero. Kelkfoje s-ino Aida eĉ faris alvokojn pere de la preso kaj radio, kiam oni tre urĝe bezonis okulmembranojn. Cetere la listoj de blinduloj, kiuj atendas kuracadon, estas ĉiam longaj. Estas ĝojiga fakto ke la operacio preskaŭ ĉiam rezultas bone. La specialistoj deklaras ke le malmultaj malsukcesoj nur okazas kiam oni ne povis fari ĝustan diagnozon.

La donacitaj okuloj estas utilaj ankaŭ al aliaj celoj: post forigo de la membranoj oni uzas ilin por eksperimentado kaj tiamaniere la scienco de la okulkuracado faris grandajn progresojn en la lastaj jaroj.

Jen belega maniero por bonfari ankoraŭ eĉ post sia morto, al suferanta kunhomo!

Okulisto.



NIA 24a EN LOURDES

La dato jam rapide alveniĝas, do estas la plej urĝa tempo anonci vin, ĉe la sekr. de I.K.U.E., s-ro L. de Jong en VLEUTEN (Nederl.) se vi ankoraŭ ne faris tion.

En Parizo okazos **antaŭ-kongreso**: jen la programo:

Sabato 9 Aŭg.: Vizito al Louvre Muzeo 10 h.

15 h. Promenado laŭ la Grandaj Bulvaroj.

Dimanĉo 10 Aŭg.: S.Meso en Baziliko Sankta Koro de Montmartre.

Kunveno en salono de la paroĥo St.Jean de Montmartre.

Komuna simpla manĝo en la pilgrim-manĝejo de Montmartre.
 Posttagmeze: vizito al Notre Dame, Ste Chapelle, Panthéon.
 Lundo 11 Aŭg.: Vizito de la Kastelo Versailles.
 Mardo 12 Aŭg.: Promenado tra Parizo.
 Posttagmeze: Vizito al la kapelo de la aperoj de la Mirakla Virgulino, rue du Bac.
 Vespere: Foriro de Parizo al Lourdes.
 Anoncoj por la antaŭ-kongreso ĉe: Esperanto, 41 rue Descartes, Paris-5a.
 La programo de la **Kongreso en Lourdes:**
 Merkredo 12 Aŭg.: 14 h. Malfermo de la akceptejo
 16 h. Laborkonsido de la Estraranoj
 18 h. Komuna vizito al la Groto
 21 h. Procesio de Kandeloj
 Jaŭdo 13 Aŭg.: 9 h. solena S.Meso kun prediko en Esperanto.
 11 h. Malferma kunsido
 12 h. Fotografado
 15 h. Procesio de Sta Sakramento
 21 h. Estrarkunveno kun Rerezentantoj.
 Vendredo 14 Aŭg.: 8 h. S.Meso kaj Krucvojo
 Poste, libera tempo por laŭvola ekskurso.
 Sabato 15 Aŭg.: Partopreno al ĉiaj solenaĵoj de la festo de Asumpcio.
 15 h. Vizito al la tombo de Pastro E.Peltier.
 17 h. Procesio de Sta Sakramento.
 21 h. Estrarkunveno.
 Dimanĉo 16 Aŭg.: 8,30 h. Solena S.Meso
 10 h. Ĝenerala kunveno de I.K.U.E.
 Posttagmeze: libera tempo por promenado en la ĉirkaŭaĵo: Betharram aŭ Pic du Ger.
 vespere foriro al Parizo.
 Lundo 17 Aŭg.: 9 h. S.Meso
 10 h. Ferma Kunsido.
 Lia Eminenca Moŝto Theodor, Kardinalo Innitzer, ĉefepiskopo de Wien, akceptis la membrecon de la Honorkomitato de nia Kongreso.

★★★

LUMPROCESIO EN INUNDITA POLDERO.

Sur la sudholanda insulo Goeree-Overflakkee, kiun por eksterlandanoj strangan nomon vi sendube ofte legis en la gazetoj en Februaro pasinta, ĉar la insulo estas unu el la plej grave trafitaĵ de la akvoŝturmo, situas la vilaĝo Achthuizen, katolika komunmo sur cetere preskaŭ tute protestanta insulo. Antaŭ jaro ĉiuj domoj solene estis dediĉataj al Nia Sinjorino de Fatima; dum la terura nokto de la unua Februaro pasinta la vilaĝo estis inundita kaj

suferis grandegajn materiajn damaĝojn, sed eĉ ne unu homa vivo perdiĝis, dum en la apuda vilaĝo Oude Tonge dronis preskaŭ 300 personoj.

En la nokto de la 12a de Majo pasinta, la memordato de la apero de Nia Sinjorino en Fatima, okazis en Achthuizen grandioza manifestado por danki Dion kaj la Sanktan Virgulinon pro tiu mirakla savo, ĉar, kiel diris la paroĥestro Dessing en sia fest-prediko: „Ĉi tio ne estas hazardo, sed Maria en tiu katastrofa nokto vere etendis sian protektantan mantelon super nian vilaĝon”. La statuo de N. S. de Fatima tronis meze de multegaj floroj, dum ĉiuj vilaĝanoj estis surgenuie ĉirkaŭ ĝi. Pere de gramofondiskoj sonis el la turo la sonoriloj de la Sankta Petro-baziliko en Romo kaj konataj melodioj honore de Maria. La paroĥestro denove dediĉis siajn paroĥanojn al la Senmakula Koro de Maria kaj memorigis al la devo de dankemo kaj pentofarado. Poste la konata radioparolanto, patro Loop s.m.m. faris kortuŝan predikon.

Kvaronon antaŭ la deka senfina lumprocesio akompanis la statuon de Maria ekster la preĝejon: centoj da homoj kun brulantaj kandeloj preĝante iris laŭlonge de la digo, preter la domoj, kaj pluen, en la salsaturitajn polderojn, kie provizore nenio povos kreski krom iom da mizeraspekta hordeo, kie la mortantaj arboj fantome leviĝas el la salblanka tero, kie la grupoj kiel aro da ĝirafoj staras sur digoj kaj kie la sablosuĉiloj jam dum monatoj laboras por ripari la akvobarilojn.

Post reveno oni kantis sub la stelkovrita ĉielo, antaŭ la S.Sakramento, la Kredon kaj post la beno sonis triumfo kaj dankeme „Christus vincit, Christus regnat, Christus imperat!” — Kristo venkas, Kristo estas Reĝo, Kristo regas! Kvar vualitaj knabinoj en vastaj bluaj manteloj denove portis la statuon en la preĝejon, kie je noktmezo komenciĝis la dumnokta adorado de la S.Eŭkaristio. Frumatene estis celebrataj sinsekve diversaj S. Mesoj; je la 7a la solena Meso kun ĝenerala sankta Komunio kaj post tio speciala S. Meso dum kiuj la infanoj komuniĝis. Ĉi tiu vilaĝo ne estas adoptia de iu nederlanda aŭ eksterlanda urbo, kiel aliaj trafitaj komunumoj, sed la enloĝantoj sentas sin feliĉaj sub la alta protekto de la Patrino de Dio.



KATOLIKA ELDONO DE LA BIBLIO EN ESPERANTO II

Nur pro gravaj mahelpoj la katolika eldono de la Biblio ĝis nun ne aperis kaj bedaŭrinde ne baldaŭ aperos. Unua malhelpo estas la jam ekzistanta nekatolika eldono! Multaj el la ne-katolikaj esperantistoj certe jam posedas tiun eldonon kaj tial ne aĉetos alian ekzempleron. Do novan multekostan eldonon devas ebligi nur la katolikaj esperantistoj. Ĉiu spertulo pri la katolika esper-

anto movado tamen scias, ke niaj rondoj el financa vidpunkto tute ne kapablas sufiĉe subteni tian entreprenon. Ankoraŭ pli grava fariĝas tiu argumento pro la fakto, ke la traduko de la Malnova Testamento estas de la Majstro Zamenhof mem. Do katolika eldono ne nur konkuru kun iu ajn alia, sed kun Zamenhofaĵo!

Alia grava malhelpo estas la fakto, ke fidinda traduko de la Biblio-teksto nur povas esti farata de fakuloj, kiuj ne nur sufiĉe scias Esperanton, sed krome la antikvajn lingvojn kaj la teologiajn sciencojn. Estas vere, ke la jam ekzistanta esperanta traduko tre faciligos tian laboron. Sed restas multa laboro farenda antaŭ ol tiu traduko estas prespreta. Ekzistas ankoraŭ tria konsiderinda malhelpo. Multaj libroj el aliaj lingvoj restas nekonataj, ĉar ni ne povas legi tiujn lingvojn restas nekonataj, ĉar ni ne povas legi tiujn lingvojn. Esperanta traduko tiam ebligas la legadon. Sed la Biblio jam estas publikigita en multaj lingvoj. Ĝi estas eĉ la plej disvastigita libro en la mondo. Do plej multaj esperantistoj jam povas ĝin akiri kaj legi en gepatra lingvo kaj pro tio ne aĉetos esperantan eldonon. Tiuj malhelpoj tamen nur ekzistas por ke ni ilin venku! Se ne per unu batalo la tereno estos okupata, ni faros tion paŝon post paŝo!

Se niaj rondoj ne povas finance ebligi la eldonon de la tuta Biblio, certe ili povos tion parton post parto. Kaj laŭ la sama vojo la dua malhelpo eble solviĝos: la nova traduko de la tuta Biblio estu tro granda entrepreno, tamen traduko de iu parto pli facile sukcesos. Pli urĝa estas la propra eldono de la Nova Testamento ol de la Malnova Testamento; kaj el la Nova Testamento plej urĝas la traduko de la kvar Evangelioj kaj de la Agoj de la Apostoloj. Tiuj partoj do unualoke estu tradukataj. Sed la tria malhelpo ankoraŭ postulas respondon! Estas vere, ke en multaj lingvoj la Biblio-traduko jam estas tre disvastigita, tamen tri aliaj faktoj estas menciindaj:

1^o. En diversaj lingvoj nur ekzistas nekatolika eldono pro la fakto, ke la nombro de la katolikoj en tiuj popoloj estas malgranda, ekz. ĉe la skandinaviaj popoloj. Tiuj katolikoj do jam estas devigataj uzi alilingvan tradukon kaj tiel ankaŭ eldono en Esperanto povas esti bonvena.

2^o. La moderna Biblio-scienco estas sufiĉe juna kaj akiris gravajn rezultojn. Ĝis la komenciĝo de nia jarcento preskaŭ nur la traduko de la malnova Vulgato-teksto troviĝas en katolikaj Biblio-eldonoj. En diversaj lingvoj ankoraŭ nuntempe nur ekzistas tiu teksto. La apero de nova traduko en Esperanto, kiu profitas de la modernaj sciencaj rezultoj do povas esti pliriĉigo por tiuj legantoj, kiuj en gepatra lingvo ne jam posedas modernan tradukon!

3^o. La aldono de eksplikaj notoj ebligas ne nur al katolikaj, sed

ankaŭ al nekatolikoj pli bonan komprenon de la teksto mem. Tiu aldono pro tio donas specialan valoron al la katolika Biblio, kiu mankas en aliaj.

Ĉio ĉi do povas stimuli la disvastigon de katolika eldono de la Biblio en Esperanto!

H. G. Wannemakers S.J.



POR NIAJ VIRINOJ

PRAKTIKAJ KONSILOJ.

Vi povas eviti ke gutoj da oleeca fluidaĵo grasigas la botelon, se vi volvas pecon da lano aŭ pippurigilon el lano ĉirkaŭ la kolon de la botelo. ★★★

Larĝa, plata peniko estis tre praktika por senpolvigi meblojn kaj aliajn objektojn kun entranĉoj, kurbaĵoj kaj skulptaĵoj, kiujn oni per alia purigilo preskaŭ ne povas atingi ★★★

Per ordinara sigelvakso vi povas ŝtopi truetojn en ujoj, kiuj nur bezonas enhavi malvarmajn fluidaĵojn, kiel vazoj, verŝiloj ktp. Varmigu la sigelvakson en la flamo de kandelo kaj ŝmiru ĝin sur la truo. ★★★

Ledaj objektoj malmoliĝintaj pro malsekeco aŭ longa neuzo, povas denove akiri sian antaŭan flekseblecon si vi ŝmirfrotas ilin per miksaĵo konsistanta el kvar partoj da hepatoleo de moruo kaj unu parto da cero, fondita sur malgranda fajro. ★★★

Gladi estas laciga laboro kiu, se oni faras ĝin dum longa tempo, plej ofte kaŭzas dorsdoloron. Anglo nun invitis lignan brakseĝon kun almontita gladtabulo, tiel ke oni sidante povas fari la laboron. ★★★



REDAKCIA LETERKESTO

Al ĉiu Abonantoj. Vi povas direkti al ni demandojn kaj sugestojn koncerne la redaktadon ktp. Por ŝpari tempon kaj ankaŭ la altajn afrankojn ni ne ĉiam respondos al ĉiuj persone, sed ĝenerale deponos la respondojn en ĉi tiun keston, precipe tiujn kiuj ankaŭ al aliaj personoj povus esti utilaj.



POR KORESPONDEMULOJ.

Mi deziras interŝanĝi k.ĉ.l. kartojn aŭ bildetojn de la Dipatrino. P.Treves, Guayaquil 222, B.Aires — Argentina.

Prizorgisto Karlo Wert-Müller, München-2, Hotterstr. 2, deziras kor. k. kolegoj de la tuta mondo.

Seminariisto Baniĉ Vid, Voĉarska 106, p.p. 345, Zagreb II, Jugoslavio deziras korespondi.

20-jara porpastra stud. dez. kor. k. anglaj k. francaj kat.stud. - esperant. pri interecaj temoj, ankaŭ franc- k.anglalingve. Jaques Tuinder, Kerst. vd Bergelaan 69b, Rotterdam-N.



L I B R O L I S T O .

*Nur por kleraj plenkreskuloj. Aŭfranko 10 ⁰ / ₀ alkalkulota. Prezoj en ned. guld.	
*Baekelmans, Elektitaj noveloj	f 0,80
J. Baghy, La verda Koro, por progresantoj	- 2,25
* „ Verdaj Donkiĥotoj	- 2,00
P. Bennemann, Miru, pensu, ridu !	tolbind. - 5,40
*Boudier-Bakker, Surprizoj, trad. Tekla Flint, broŝ. f 3,75	„ - 4,50
H. Bulthuis, Idoj de Orfeo, 540 pp. nur bonaspektaj uzitaj ekz.	f 1,90
„ Inferio, romano pri Ameriko	bind. - 2,90
„ La Vila Mano, ilustrita	„ - 3,40
v.d.Cammen, La Geedzeco, 78 pp.	- 0,25
Sac. Carolfi, La Padova Lilio (S. Antonio) ilustr.	- 0,50
„ La Reformanto (S. Francisko de Asisi) ilustr.	- 0,50
„ Preĝareto, la plej gravaj preĝoj, S. Meso ktp	- 0,75
Chesterton, La naiveco de pastro Brown, detektiva	bind. - 3,10
Collodi, Pinokjo, trad. Marchesi broŝ. f 1,50	bind. - 3,10
Degreef, La radiantanta Lotuso	- 1;25
Delsuno, Formortinta Delsuno, rakontita de li mem! amuza	- 1,25
Dickens, La Batalo de l'Vivo, ilustr.	tolbind. - 1,95
V. Dorno. La Aventuroj de L.R.M. Sultulof la Xa, sprita	- 0,55
*Fr. van Eeden, La malgranda Johano, trad. H. Bulthuis	- 1,20
Eola, La amo en la jaro dekmil, 350 pp.	bind. - 2,85
Edna Ferber, Fanny, trad. B. Fabo.	tolbind. - 3,10
J. Filip sac., Ĉeĥoslovakaj popolkantoj en Esp. k muziknotoj, ilustr.	- 2,25
*Forst de Batt., La mistero de l'Sango (scienca)	- 1,50
W. Fricke, Universala legolibro	- 1,25
Gerstäcker, La Maro, rakontoj el marista vivo	bind. - 2,10
Wilh. Hauff, La Kantistino, trad. Wüster	- 0,45
*A. Hekler, Arthistorio, trad. Kalocsay, 146 fotoj, bros. f 7,—	bind. - 8,00
Heroldo, Mozaiko, div. rakontoj kaj skizoj	- 0,30
„ Sub la Signo de l'Espero, rakontoj el Esp. vivo	- 0,30
D.ro Kabe, Unua Legolibro	- 1,25
Kalocsay, La Gramatika karaktero de la Esp. radikoj	- 0,40
„ Dek du poetoj broŝ. f 2,—	bind. - 2,50
*H. Kirk, Taglaboristoj	bind. - 2,90
M. Koenen, La Sunkrono, novelo	- 1,25
*Korolenko, La sonĝo de Makaro, trad. M. Ŝidlovskaja	- 0,40
*Limburg Br., Akbar, orienta romano	lukse bind. - 3,50
Dan Lord S.J., Flirto, 48 pp.	- 0,15
Ign. de Loyola, Spiritaj Ekzercaĵoj	- 0,85
Luycken, Ŝtranga Heredaĵo	bind. - 2,90
„ Pro lŝtar	tolbind. - 4,50
D.ro Manders, Esperantologio kaj Lingvistiko	- 2,25
*Maxwell, Anstataŭa Edzino	bind. - 2,85
F. Molnár, La Knaboj de Paŭlo-Strato	- 1,20
Montfort, La Mistero de Maria	- 0,55
Müller, Rembrandt, La Magiisto, k. 100 reprod.	bind. - 5,00
*de Musset, La du Amatinoj k. aliaj noveloj	- 1,25

G. Norway, La Aventuroj de Marteno Drake	bind. f	2,75
E. Pizzi, La Floretoj de S. Francisko de Asisi	-	0,70
„ La Protektanto	-	0,25
E. A. Poe, Ses Noveloj	-	0,75
*D-ro Privat, Vivo de Zamenhof	bind.	- 3,10
Raimund, La Malŝparulo	-	1,20
Randag C.s.s.R., Ĉu vi sciis tion pri la Framasonismo?	-	0,25
Reitzel, Aventuroj de Malspertulo	-	0,45
Roche S.J., Nia Mesmistero	tolbind.	- 0,75
M. Sabbe, Virina Koro	-	0,65
Ŝal. Alejhem, Hebreaj Rakontoj	-	0,75
*Schreiner, Romano pri Afrika Bieno	-	1,50
Shakespeare, Antonio kaj Kleopatra	-	1,50
„ Romeo kaj Julieto	-	1,50
„ La gajaj Edzinoj de Windsor	-	2,00
Sienkiewicz, Noveloj, trad. Lidja Zamenhof	-	0,75
P. Smeehuijzen, Katolika Librelektilo	-	1,50
Storm, Du Majstronoveloj	bind.	- 2,10
Stuttard, La Virineto en Bluo	-	2,30
van Sutter, Potenco Infera, pri du demonposedataj infanoj	-	0,75
*Szilagy, Dua Rapsodio, Tria Rapsodio	po	- 1,80
*Th Thijssen, La nevenkebla ĝeno	bind.	- 4,90
Timmermans, Kristnaska Triptiko, ilustr.	-	0,50
*Turgenjev, Elektitaj noveloj	-	0,75
Uytterdijk, S-ro Longkrurulo, k. 152 bildoj	-	1,25
Vanweddingen, Sub la vitra Kupolo, romano	-	1,25
v. d. Vondel, Jozef en Dotan, biblia tragedio	-	1,25
Wannemakers, Tutmonda Laŭdo, preĝlibro	-	4,75
*H. G. Wells, La Dormanto vekigas	bind.	- 3,10
* „ La Tempo-masino	-	1,20
Wisemann, Fabiola, il. 445 pp.	bros. f	4,50
	lukse bind.	- 8,00
Wodehouse, La Princo kaj Betty (humorista)	-	1,20
Zamenhof, Fundamenta Krestomatio,	bros. f	5,50,
	bind.	- 7,50
Vortaroj, Plena Vortaro de Esperanto	tolbind.	- 11,50
Schidlof. uitgebreid Zakwoordenboek	„	- 2,25
Naŭlingva Etimologia Leksikono, L. Bastien	„	- 7,00
Konversacia Vortaro, ŝerca difinio de la vortoj	-	0,20
M. E. Biblioteko, 19 n-roj div. temoj, petu prospekton,	po	- 0,35
Bildetoj de S. Ignacio de Loyola kaj de N.S. de ĉiuj Popoloj	po	- 0,05
Multkoloroj reprod. de Ned. pentristoj, poŝtkartoj, 11 div.	po	- 0,08
Esperanto Insignoj	-	1,00

Tiujn ĉi kaj multaj aliaj titoloj, lernolibroj, esperantaĵoj ktp estas ĉe ni haveblaj.

Mendoj kaj Pagoj: por Nederlando al f-ino T. Durenkamp, Dordrecht, p.k. 214009. Por aliaj landoj al la landaj perantoj aŭ al la kasisto de I.K.U.E. en Vleuten, Nederlando, al kiu vi sendu pagateston por plirapidigi la alsendon de la libroj.